

Literaturaj perloj, 11-a parto
Kontrastoj de Julio Baghy
Claude Gacond, 253-a radioprelego, 1968.08.14 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni legas hodiaŭ erojn el *Kontrastoj*, alia novelo de Julio Baghy.

A.- « Post la bonvola programo oni aliformas la teatran salonon – dancejo. Sur la seĝoj, vicigitaj ĉe la muroj, eksidas la ĝusopira junularo. En iu fora angulo tabletoj invitas la tetrinkontojn...

Cl.- Babilado... La temo estas tradicia : Esperanto estas mirinda lingvo. Ĉiuj raciaj kaj absurdaj, prudentaj kaj naivaj argumentoj klopodas konvinki la konvinkitojn...

A.- Subite ritma blekado, knarado, tintado kaj sonoj, similaj al nazblovado, alvokas la atenton al si... Pala junulo entuziasme turmentas la perfektigitan inventaĵon de Edison. Li streĉas kaj restreĉas la risorton de gramofongiganto. La disko turnas sin kiel freneziĝinta ŝafo.

Cl.- Baldaŭ mi restas sola ĉe la tablo kaj brave kontraŭstaras al la parulserĉa rigardo de ĉarmulinoj, restintaj sen dancisto pro manko de viroj... Ĉiam okazas tiel. Mi restas senindulga kaj kruela pro nescio de la modernaj dancoj. Mi restas silenta observanto. La saksofona ridado, plorado, veo kaj ĝemo sieĝas miajn nervojn. La diversaj batinstrumentoj tamburas sur miaj orelmembranoj. Nekonataj ekzotikaj muzikiloj penas forgesigi, ke ekzistas ankaŭ pli harmonia muziko ol tiu ĉi kakofonio...

A.- La orelfendan senmelodiecon de la ĵazmuziko mi povas aŭskulti nur kun fermitaj okuloj. Jen, tuj aperas en mi vizio pri ĝangalfina vilaĝeto. La afablaj kanibaloj per tia voĉĥaoso bonvolas timigi kaj narkoti sian viktimon kaj ĉe la sonoj de tia maŝinpafila tamburado ili saltadas ĝis lupapetito...

Cl.- Mi malfermas la okulojn... Kia ironio !... La sangvipa batalemo de la primitiva homo ĉi tie dronas en la ŝlimo de la deco. La ĝangala temperamento kontentiĝas je promenpaŝoj. La indiĝena plastiko degeneras al simpla incito de sensoj. La nudeco estas samtempe multa kaj nesufiĉa, ĉar ĝi levas digon al la vekita sento. La plimulto de la dancantaj paroj estas samseksaj : virino kun virino... Mi turnas for mian rigardon. Ĉe la najbara tableto sidas ĉarma junulino. Mi legas el ŝia mieno. Tre verŝajne ŝi enuas. Kuraĝige mi ridetas al ŝi. Danka rerideto rekompencas mian komprenon. Mi ŝanĝas la tablon kaj eksidas al la ŝia.
- Ĉu vi ne dancas ?

A.- Ne... Mi ne havas kavaliron... Ĉu vi ne dancas, sinjoro ?

Cl.- (Mi profitas la bone provizitan motivon) *En la pasinta jaro mi estis operaciita.* (Pro tio mi povus danci sen danĝero !)

A.- Ĉu apendicito ?

Cl.- Jes kaj ankoraŭ io bagatela.

A.- Ĉu la stomako ?

Cl.- Nu, ankaŭ ĝi ne estis en bona ordo.

A.- Kompreneble. Vi ne estas vegetarano.

Cl.- Ne.

A.- Mi rimarkis. Vi konsumis ŝinkon.

Cl.- Ĝi estis tre bongusta.

A.- Baĥ, iluzio !

Literaturaj perloj, 11-a parto
Kontrastoj de Julio Baghy
Claude Gacond, 253-a radioprelego, 1968.08.14 & 17

Cl.- (Mi ridetas. Neniam mi estus supozinta, ke iu nomos la ŝinkon – iluzio. Kaj en tiu momento mi faras nepardoneblan demandon.) *Ĉu vi estas vegetaranino ?*

A.- *Jes, tio mi estas.*

Cl.- Tiel serioze, kvazaŭ inspirite ŝi asertas la fakton, ke mi decidus ne plu tuŝi la temon. Vere, mi ne miras. Inter la gesamideanoj ja abundas la adeptoj de la diversaj idealoj kaj ideoj « ismoj »... Ĝuste tiuj « ismoj » kondukas al la – kvinpinta verda stelo. Al la « stelo » - mi diras – kaj ne al la lingvo. La lingvon ja ili apenaŭ balbutas... Mi komencas novan temon, sed vane. Kiel la pala junulo streĉas la risorton de la gramofono, same ankaŭ mi metis per nepripensita demando la diskon de elokventaj argumentoj sur la turniĝantan mensoplaton. Mi devas konatiĝi kun la aventuro de princo N. N.

A.- *kiun la teruraĵoj en publika brutbuĉejo varbis pro la viandabomena movado.*

Cl.- Mi sciiĝas pri reŭmatismo, baldaŭ atakonta min kaj mi ricevas aŭguron pri tio, ke mi mortos pro

A.- *arteriosklerozo.*

Cl.- Krome mi estas instruata, ke

A.- *la viandmanĝado emigas la homon al troa amemo kaj vualigas la klarajn perceptojn pri idealaj celoj.*

Cl.- Fine mi sentas min mortpikata per la lasta argumento :

A.- *Kulturhomo povas esti nur – vegetarano. Verdire mi miras, ke vi, ĝuste vi, la batalanto por nobla ideo, ankoraŭ ne konsciiĝis pri tio kaj ne liberigis vin el la katenoj de la kanibala kutimo.*

Cl.- Mi dankas pro la kaŝita komplimento kaj enpensiĝas. Neniam mi neis la utilajn celdifinojn de la vegetarismo. Troviĝas iom da vero en la akuzo pri kanibalismo. Jes, jes ! Heredaĵo de la ĝangalvivo. Diferenco troviĝas nur en tio, ke oni ne plu dente ŝiras la krudan viandon, sed oni civilize per tranĉilo kaj forko liveras al la maĉiloj la rafinite spicitan porkaĵon. Tiu ĉi apostolverva knabino absolute pravas. Se mi ne povas toleri la tamburadon, rememorigantan pri la ĝangalo, do ne estas dece, ke mi kapitulacu al ĝia sovaĝa tradicio. Kaj ankaŭ vorte mi komunikas al ŝi mian penson.

A.- Pro ĝojo ekbrilas ŝia rigardo, kontenteco sorĉas rideton al ŝiaj vangoj. Jen, ŝi sukcesis varbi novan adepton.

Cl.- Ni interparoladas... babilas... iomete eĉ klaĉadas. Junulo haltas ĉe mia tablo kaj klinas sin dancopete antaŭ ŝi...

A.- Ili fordancas.

Cl.- Mia rigardo sekvas iliajn movojn, mienon kaj vidas la ekflamiĝon de la juna sango. Ŝiaj vangoj flamas. En ŝiaj okuloj ardas fajrero kaj sur ŝiaj belformaj lipoj flirtas kisemo.

A.- Jen, jen, ankaŭ la karoto, napo, petroselo kaj ceteraj legomoj ne malpliigas la junecan vervon.

Cl.- Ne malpli ardas la vivoĝojo en ili ol ĝi brulis en mi dum miaj adoleskaj kanibalaj jaroj... Por mi jam ne malutilas la viandomanĝado, nek utilas la maĉado de radiko... Mi estas avo...

A.- Danco sekvas dancon.

Literaturaj perloj, 11-a parto
Kontrastoj de Julio Baghy
Claude Gacond, 253-a radioprelego, 1968.08.14 & 17

Cl.- Mia tabla najbarino preskaŭ flugetadas de brakoj al brakoj, sed ŝi ĉiam revenas kun printempa rideto al la muzikanta koro de la unua kavaliro.

A.- Tiel estas bone ! Tiel estas orde !

Cl.- Mia koro ridetas kaj mi forgesas, ke ĉio ĉi okazas laŭ la ritma kakofonio de miaj kanibalaj fratoj...

A.- La gramofono fine trumpetas la lastan marŝon. La paroj disiĝas.

Cl.- Ankaŭ mi rapidas al la vestiblo. Tumulto. Atendo. Fine mi ree posedas mian surtuton. Ĉe la ŝtuparo maneto, etendata al adiaŭo, haltigas min.

A.- *Ne forgesu, kara sinjoro. Kulturhomo povas esti nur vegetarano.*

Cl.- Mi ne respondas, nur ridetas. Tiu rideto kaŝas mian momentan konsterniĝon. Mia tabla najbarino estas volvita en grandan pelton. Tre eleganta pelto. Por ĝi almenaŭ cent senkulpaj bestetoj pagis per sia vivo. Mi ridetas, ĉar mi ne kuraĝas envortigi mian opinion... Mi manpreme adiaŭas de ŝi kaj de li. Ili rapidpaŝe ekiras. Mia vojo kondukas al la sama direkto... Rapidpaŝe, laŭte ridante ili iras antaŭ mi.

A.- La vivoritmo harmoniigas iliajn movojn kaj estas ĝojo vidi ilin...

Cl.- tamen la vegetarismo kaj la pelto konstante incitas mian menson. Kontrasto... tragikomika kontrasto...

A.- La tuta homa vivo konsistas el tiaj kontrastoj...

Cl.- Amaraj pensoj kurbigas ironie miajn lipojn kaj... mi ridetas. »

A.- Vi povas relegi tiun priskribon de samideana atmosfero en la libreto *La teatra korbo* de Julio Baghy. La titolo de tiu novelo estas *Kontrastoj*.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-